

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

JARABONO :

Simpla : 3 fkoj
Subtena : 5 fkoj
Bonfara : 10 fkoj

Sendotaj al : Micard Henri
Kulturaj kajeroj
Epineux-le-Seguin (Mayenne)
C. C. P. Nantes 2349-62

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pagô 4)

MAJO - JUNIO

1961 3

KULTURAJ KAJEROJ

1961 Majo - Junio

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

René Watier
Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesata post interkonsento kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

E. Lapenna skribis por vi : Jugoslavo meditas rigardante francan filmon.

Esperanto tra la mondo.
TURISMO :
Vojaĝo tra Provenco (II. - Arles) (F. Garrigue).

EL IE EN LA MONDO :

Ĉefaj aŭ flankaj studobjektoj ? (P. Balkanyi).

Internacia evento : La 24-hora aŭtokurado en Le Mans (H. Delgove).

La Latina Kvartalo.

Kulturaj aranĝoj en la E.K.D. : La ekzistencialistaj herooj (C. Llech-Walter).

Tra la Esperanta Literaturo : Ivan Malfeliĉulo **(S. Guillot).**

Por via distro.
Por viaj infanoj : Tri fratoj (fabelo de Grimm).

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

EMILIJA LAPENNA SKRIBIS POR VI :

Jugoslavo meditas rigardante la Francan Filmon

Nu, ĝi venis kun ioma malfruiĝo, sed estas noble lasi atendi al si, la franca filmo konas la la leĝojn de ĝentileco kaj degnis prezenti sin al la jugoslavia publiko du jarojn post kiam la franca rigardis ĝin. Sed la malfruiĝo nur utilis al pli bona kompreno de la filmo. Ekzistencialismo estas la franca produkto, la franca junularo estis la unua, kiu transplantis la ideojn en la vivon.

Necesis iom da tempo ĝis la vivkutimoj de junularo el Parizo penetru ĝis la periferio de Eŭropo. Ĉuste nun la ekzistencialisma bruo el la centro reeĥas en la foraj partoj. Junularo volas esti originala, nepre alia ol nejunularo. Troigo estas la ĉefa elemento, kiu pruvas la harmonian apartenon al sia epoko kaj sia generacio. Troigo en ĉio, precipe en la kompreno de libereco.

Francoj scias fari filmojn, ili tion pruvis ne unu foje. Ankaŭ la filmo « Trompantoj » (les Tricheurs) estas bona filmo en ĉio — tekniko, scenoj, dialogoj, situacioj kaj aktorado. Ĉi kredige prezentas la arton de la franca junularo, ne grave se tiu junularo vere estas tia, aŭ ne. La filmo havas sian veron. Ĉin la eksterlanda publiko ekkonas kaj akceptas kiel la ĝustan, ofte ne havante eblecon koni la realan fundamenton sur kiu la filmhomoj elkonstruis la filman veron. La sola vivprincipo de la junularo el la filmo estas labori nenion, sidi en kafejoj kaj nokte drinki en rock'n roll danc' kaj seks' orgioj. Tio signifas esti liberigita je sentoj, tradicio, devigoj, atentemo kaj respondeco. Ĉio perfekte ebligita dum ekzistas bonkoraj fratoj laboristoj, kiuj senriproĉe lasas eluzi sin, grandanimeco de patroj fabriskistoj kaj originaleco de gepatroj aristokratoj, kiuj disponigas siajn kastelajn salonojn al la senbride temperamenta societo de sia filino. La epilogo de tiaj « jour » estas amaso da frakasita multekosta porcelano, orumitaj foteloj, historiaj lustroj. Ĉarma franca junularo, kiel multekostan kadron ĝi bezonas por siaj tumultaj amuzoj ! Feliĉe, en Jugolavio ne ekzistas privataj feŭdaj kasteloj kaj la jugoslaviaj junaj ekzistencialistoj en sia rock'n roll bakanaloj povas rompi nur lignajn benkojn kaj glasojn fabrikitajn el la plej malmultekosta vitro.

La filmo nur prezentas la parton de la franca junularo, ĝi ne riproĉas, ĝi ne kondamnas. Bravo, tio estas kuraĝa, ne ĉiuj filmindustrioj kapablus montri similan aŭdacon. Junuloj ŝatas la « Jaguaron », akiras ĝin per senskrupula vojo de ĉantaĝo, la filmo ne kondamnas tion, ĉar « per honesta laboro la plimulto neniam akiras la « Jaguaron ». Ho, bone ke en Jugoslavio oni ne produktas luksajn aŭtomobilojn, la tento, do, estas malpli granda. La filmo ne kondamnas priŝtelon de la propra patrino, nek knabinon, kiu ridegas super la amuza situacio ne sciante kiu patrinigis ŝin. Ne, ĉion tion la filmo ne kondamnas. La junularo trovis sufiĉan pravigon por tia konduto en sia vivmedio. La filmo kondamnas nur mensogon, mensogon al si mem. Mankon de la kuraĝo konfesi la veron al si mem kaj trovi du-tri simplajn vortojn kapablajn konstrui la ponton ĝis la alia koro. Sed sincereco ne estas moderna. Esti enamiĝinta signifas esti ridinda en la rondo de junaj ekzistencialistoj. Kiu tamen faris tiun krimon, meritas la morton. Tre modernan morton en « Jaguaro » fluganta sur humida ŝoseo per 160 je horo. Ĉu tiu finalo estas la instruo de la filmo ? La morala prediko ? Ĉu ĉiu juna ekzistencialisto, kiu enamiĝas, devas morti en ŝtele akirita « Jaguaro » ? Kaj kiuj ne mortos ? Ĉu ili meritas vergobatojn aŭ kontrau-ekzistencialismon ? Multaj demandoj — la filmo ne respondas al ili.



Esperanto tra la Mondo

Ferioj per esperanto

Jen kelkaj esperantistaj manifestacioj kiujn ni ankoraŭ ne anoncis :

— Feriaj Kultur-semajnoj, 6-20 de aŭgusto, Kastelo Münchenwiler apud Murten-Morat, Svislando. Informoj : Svisa Esperanto-Instituto, Breitenrainstrasse 12, Bern.

— Esperantista Libertempejo sur Adriatiko, precipe por gejunuloj ; tendaro aŭ loĝejo en hotelo en la golfo de Primosten (inter Split kaj Sibenik). Skribu al : Astronomia Observatorio, Esperanto-grupo, Opaticka 22, Zagreb, Jugoslavio.

— Feria Semajno, okaze de la inaŭguro de la urba kampadejo « Zamenhof » en Vallon Pont-d'Arc, Francio, 22-30 7. Skribu al : Grupo esperantista, Chemin de Baza, Aubenas (Ardèche) Francio.

— Aŭtunaj Feriaj Kursoj, 15-22 10 ; en Vejle, Danujo. Adreso por informo : S-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhoj, Danujo.

— Fine de la jaro : Skiferio de T.E.J.O. en Fiizmoos, Austrujo.

— En 1962 (14-21 de aŭgusto), en Romo : Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. Adreso : F-ino E. Cipriani, via R. Bonghi, 34, Romo.

Estontaj Universalaj Kongresoj

1962 : Kopenhago ; 1963 : Sofia ; 1964 : Parizo ; 1965 : Tokio .

Esperanto-stratoj

En la mondo, ekzistas almenaŭ 130 stratoj aŭ placoj kun la nomo Zamenhof aŭ Esperanto. Francujo tenas la rekordon.

Nova vortaro Franca-Esperanta

En Francujo ĵus aperis kompleta kaj bonega vortaro franca-esperanta de S-roj Léger kaj Albault. Nun, la francaj esperantistoj disponas kompletan serion de vortaroj.

Esperanto kaj radio.

En 1960, 22 radio-statioj el 13 landoj elsendis entute 1.668 programojn en la internacia lingvo.

— Franca radio respondas esperantlingve en la ĉiutaga mallongonda programo dediĉita al Sovet-Unio. Atentigu viajn sovetajn korespondantojn ! Adreso : R.T.F., Emissions vers l'étranger, section U.R.S.S., 118, Champs-Elysées, Paris (8e).

— Atentu ! La horoj de la esperanto-dissendoj en Svisa radio estis ŝanĝitaj. Sendu leterojn aŭ gratulkartojn al la de vi aŭskultitaj statioj !

En U.R.S.S.

En urbo Hâbarovsk (Malproksima Oriento de U.R.S.S.), funkcias 14 esperanto-rondoj. Petu korespondantojn al : Esperanto-rondeto, ĉe la Pedagogia Instituto, Hâbarovsk, ul. K. Marksa, U.S.S.R.

En la eldonejo « Stafeto »

En la aktiva eldonejo « Stafeto », lastatempe aperis, en unu volumo, tradukoj de : « Reĝo Edipo » kaj « Antigona » de Sofoklo kaj, ankaŭ en unu volumo : « Topaze », de M. Pagnol kaj « La Ŝipego Tenacity » de Ch. Vildrac ; fine, « Otelo » de Shakespeare estis tradukita de Rossetti. Plie, pluraj poemaj volumoj enviciĝis en la lastaj eldonitaj verkoj.

Junulara agado en Bulgario

En Plovdiv, la 4an de februaro, okazis la dua tutlanda junulara balo. Pli ol 400 junaj gastoj el 17 urboj ĉeestis la renkonton dum kiu okazis ankaŭ oratora konkurso.

Lastaj informoj pri la Universala kongreso de Harrogate

Riĉa teatra kaj arta programo estas preparata :

La « Internacia Arta Teatro », en neoficiala aranĝo, prezentos vesperon : « Unuaktaj modernaj teatrajoj ». La pianisto Roland Dupuis faros prelegon « Renkonto kun la eterna Beethoven » kun piano-ilustrajoj kaj diapozitivoj. Teatra trupo el Bristol, prezentos « La Urso » de Ĉeĥov.

La kongresa komitato invitis tri artajn ensemblojn el Ljubljana kaj plie, la Esperanto-teatro de tiu urbo ludos « La mondo ne havas atendejon ». Amatora trupo el Londono ludos unuaktan japanan dramon : « Okuni kaj Gojei » ; ktp.

— Libro-ekspozicio, por neesperantista publiko, okazos dum la semajno.

— Ŝanĝo por la Internacia Geografia Semajno (12-19 8). Ĝi okazos en Leicester.

— La Internacia kongreso de blindaj esperantistoj diskutos raporton pri « laboro kaj celoj de la Ligo de la Helpantoj de la surd-mutuloj ».

— La prezentado de filmoj kun esperanta parolo estas aktive preparata.

En la kosmo...

Pli ol 1.500 planedoidoj rondiras ĉirkaŭ la suno. La numero 1.462 kies surfaco estas 21 kv. km. estas nomita Zamenhof.

TURISMO

VOJAĜO TRA PROVENCO

II. - ARLES

O ci, kiu estis ĉio, kion oni povas esti,
La Metropolo de Imperio,
La ĉefurbo de Reĝlando,
Kaj la Madono de Libereco.
Frederiko Mistral.

Tiuj paroloj de la provenca majstra verkisto, Mistral, permesas aserti ke, trairante Arles'on, ni kontaktiĝas kun la tuta historio de tiu regiono.

La unuaj loĝantoj konataj, la Liguroj, starigis apud la urbo, en la praepoko, meze de la tiamaj marĉoj nun malaperintaj, monhiron sur la monteto « Cordos » (Pr. Kord').

La klimato, la pejzaĝo strange memorigas Italujon. Ili allogis la Romianojn. La regiono fariĝis « Provincia Romana », sekve ĝia nomo : Provenco. Arles profitis tiun allogon. Frue granda haveno, tre aktiva dank'al sia situo sur Rodano, proksime de la maro, ĝi kunligis Hispanujon kaj Gallion kun Italujo, pere de la grandaj vojoj Aŭrelia kaj Domitia. Ĝi komercis kun ĉiuj mediteraneaj urboj, vendis la tritikon de Comtat Venaissin (Venecia Grafejo), la oleojn de Provenco, la rodanajn vinojn. En la ŝipfarejoj, oni senhalte laboris. Ĉar ĝi situas apud la enfluejo de Rodano, amasoj da varoj akumuliĝis sur la bordoj de la riverego. Ili venis de ĉiuj mediteraneaj havenoj, el Oriento, Grekujo kaj Afriko. Dokistoj ilin malŝarĝis el la ŝipoj, kaj, tuj, enŝipigis ilin sur aliajn malpli grandajn por transportado ĝis la plej internaj partoj de la lando. Oni parolis ĉiujn lingvojn tiam konatajn. Oni renkontis ĉiaspecajn homojn kun la plej strangaj kostumoj : komercistojn, maristojn, soldatojn venantajn el la plej malproksimaj partoj de la antikva mondo.



ARLES : Antikva Teatro (Klišo S.I. Arles)

La urbo estis eleganta, kun sia amfiteatro, sia teatro, siaj monumentoj el marmoro, siaj belaj statuoj. La loĝantoj kuniĝis sur la vasta Forumo, la koro de la urbo. Sur ĝiaj kahelegoj, blindetigantaj pro la suno, ili promenis, kontraktis aferojn, interŝanĝis novajojn. Pluraj temploj, starigitaj je la honoro de la dioj kaj de la imperiestroj, ricevis piajojn de la popolo.

Pura akvo alkondukita er multekosta akvedukto atestas la rafinojn de la tiamaj Arles'anoj, kiuj jam ne volis trinki la akvon de Rodano. Aldonu bluan ĉielon, tian sunon vivigantan la kolorojn : vi havas spektaklon prezentitan de neniu alia urbo.

Arles konis sian veran apogeon nur dum la dekadenco de la romia imperio. Imperiestro Konstantino restadis en la urbo. Ĝi lin allogis, memorigis al li Romon pro sia situacio, sia milda klimato, siaj afablaj loĝantoj, posteuloj de la veteranoj venigitaj antaŭ tri jarcentoj de Cezaro, konservinte ĉiajn

kutimojn. La elekto de la Imperiestro pligrandigis la potencon de la urbo, kies prestiĝo ĉiutage kreskis.

La urbo pliriĉiĝis, pligrandiĝis. Oni konstruis novajn monumentojn. Ili ĉirkaŭis la publikajn placojn. Ponto el ŝipoj kunigis la du bordoj de Rodano Nova kvartalo kreskis sur la dekstra bordo. Luksegaj varmbanejoj eĉ donis sian nomon al kvartalo.

La filo de Konstantino, naskiĝis en Arles, en 314. Tiu, poste restadis en la urbo. La ludoj, la festoj konis neordinaran brilon. La kuroj en la cirko, la teatraj prezentoj estis belegaj. Neniam la urbo konis tian epokon, tiel vivoplenan, tiel gaĵan. La tuta Imperio ĝin rigardadis. Oni ĝin nomis : « Gaila-Rometo ».

La multaj tomboj borderantaj la malnovan Aŭrelian vojon formis la nekropolon « Elizeaj Kampoj ». Tie, tuj de la kvara jarcento, la nobeloj, la riĉuloj, sin entombigis. Iliaj ĉerkoj sekvis malrapide la fluon de Rodano.

Kiam la Romia Imperio ruiniĝis en la anarkio kaj la invadoj, Arles konservis ankoraŭ grandan rolon. Ĝi fariĝis ĉefurbo de sendependa reĝlando. Tiel, Arles dufoje konis la apogeon de sia gloro, dufoje ĉefurbo. Ĝi iomete konservas la nostalgion de tiu pasintaĵo pere de siaj monumentoj. La antikva profilo de ĝiaj filinoj, la stilo kaj la harmonio de iliaj kufo kaj kostumo memorigas tiun epokon.

Unu el la unuaj, la urbo konis la komunumajn institucioĵn. Ĝi profitis tre imponan kaj larĝan senimpostecon dum epoko, kiam la franca lando konis la teruran feŭdismon. Ĝi eĉ fariĝis respubliko, ĝis 1486, kiam ĝi estis definitive aneksita al franca krono. La franca asimilado ne estis tre facila kaj postulis multajn jardekojn. Hodiaŭ, ankoraŭ, la provenca lingvo estas parolata de ĉiu Arles'ano, inda je sia deveno.

La preĝejo « Sankto-Trofimo », konstruita dum la XIa kaj la XIIa jarcentoj, staras en la angulo de la placo. Ĝia kradego prezentas la finan juĝon. En la timpano Kristo prezidas la Sanktan Manĝon. La dek-du apostoloj sidas sub liaj piedoj ; en la maldekstra friso la beatigitoj akceptataj en Paradizo, en la dekstra, vi vidas la malbenitojn. En la apuda klostro, unu el la plej belaj en Francujo, vi rimarkas la diversecon kaj la nombron de la statuoj, kapiteloj, kolonoj.


Forirante el la klostro, turnu dekstren ĝis la antikva teatro, greko-roma. Ĝi povis enteni 12.000 rigardantojn kaj ankoraŭ montras siajn majestajn ruinaĵojn : belegajn ĝemelajn kolonojn el marmoro, kiuj subtenas parton de la kornico kaj stumpojn de du aliaj, antaŭe simetriaj al ili, luksega dekoracio por nunaj mire belaj prezentadoj.

Je kelkaj metroj, oni ekvidas la imponan amason de la Amfiteatro, pli popole nomita Arenoj. Konstruita dum la Ia kaj la IIa jarcentoj, ĝi povis enteni 25.000 personojn. Ĝi estas nun la plej granda en Francujo. Dek-kvin mil rigardantoj povas sidi sur ĝiaj ŝtupbenkoj. Supreniru ĝiajn saracenajn turojn, vi havos belan perspektivon al Rodano, Kamargo, Alpijoj, Kraŭo.

Revenu al placo Respubliko. En la kontraŭa angulo, iru laŭ la strato Respubliko, ĝis la « Muzeo Arlaten » (leg. Arles'ana Muzeo). Per la mono de Nobel Premio, kies laŭreato li estis en 1904, Frederiko Mistral ĝin kreis. Juvela restarigo de la pasinteco interna kaj familia de Provenco, la « Muzeo Arlaten » estas unu el la plej interesaj folkloraj muzeoj en Francujo, kun siaj portretoj, kostumoj el la diversaj epokoj, mebloj, bestoj, nenombreblaj iloj, pentraĵoj de Leo Lelée, la mastro de la arlesaninaj siluetoj.

Por fini la viziton, iru promenante, laŭirante la belegan promenadon « Lices » (pr. Lis'), sub la milda ombro de ĝiaj mikokuloj, ĝis la Nekropolo Alyscamps (« Elizeaj Kampoj »). En la tuta galloromia tombejo, vi povos ripozi kaj mediti, apud la tombo de iu riĉa prapatro.

F. GARRIGUES.



ARLES : Elizeaj Kampoj (Klišo S.I. Arles)

EL IE EN LA MONDO

ĈEFAJ AÙ FLANKAJ STUDOBJEKTOJ ?

Hungara ĵurnalo aperigis diskutojn de gepatroj pri la nunaj studobjektoj en la lernejoj, precipe pri tio, ke la rezulton montrantan ateston ofte malbeligas la klasifikadoj de la tiel nomataj flankaj studobjektoj, kiel kantado, desegnaĵo, korpedukado (gimnastiko). Kelkaj gepatroj plendis tion aldonante, ke ĉe tiuj oni ne devis esti tre severaj. Estas ankaŭ tia opinio, ke ne estu diferenco inter la graveco de la studobjektoj. « Ĉe la komunsciojn donantaj studobjektoj — skribas patrino — ne povas esti alia mezuro ol la klasifikado pri la scio de la koncerna materialo. Sed oni devus de tempo al tempo kontrolesplori, kiuj el la studobjektoj, kiuj donas la bazon de la ĝenerala klereco, rilate nian nunan epokon, estas nepre lernotaj ? » Sed el tiuj studobjektoj, se oni kunmetis ilin laŭ zorga pesado de la neceso, kaj valoro, oni ne povas elpreni kelkajn, kiel ĉefajn kaj aliajn, kiel flankajn. Ankaŭ la supre menciitaj studobjektoj ne estu esceptoj. Sed oni devas pripensi, ke la instruo de tiuj estas aŭ devas esti nun alia, ol iam. Ŝi rakontas pri siaj infanoj, kiuj iras al klasoj de la ĝenerala lernejo (egalaj en multaj landoj al malsupraj, unuaj klasoj de la mezlernejoj), ke ili devas dum la desegnaĵhoroj fari ne nur « belajn » desegnaĵojn, sed ili ankaŭ tion lernas, kiel oni devas desegni la objektojn, kiel oni devas **redakti** la bildon. Ili lernas arthistorian bazan scion, oni kondukas ilin al ekspozicioj, urbrigardadoj, ke ili vidu la rezultojn de la universala kulturo. Pri tio ili devas skribi taskojn. Tiamaniere lerninte ili pli bone taksas la diversajn artvalorajn konstruaĵojn de la urbo. « Mia fileto ne faras mirindajn pentraĵojn, sed planas loĝdomojn kaj konante la leĝojn de la lumo-malhelo li klarigas al mi, kiel ĝuste tiel li desegnis tiun domon. » « La kantado estas nun jam ankaŭ tia objekto, en kies leciono oni ne nur kantadas, sed ricevas bazan scion de la muzika kulturo. Oni devas ĝoji, ke hodiaŭ kiam la radio alportas la muzikon ankaŭ tien, kie ne estas okazo viziti koncertojn, oni direktas la intersiĝon de la infanoj al la muziko. Do oni klasifikas ne la « kantadon », sed la kunligitajn sciindaĵojn. »

Eble pli grava estas la demando pri la gimnastiko. Tie ne estas bazaj lernotaj scioj. Ĉia valoro estas do saniga kaj disciplinige. Tial ŝi proponas, ke ĉe la ĝenerala klasifikado, ĉar cetere bonaj lernantoj povas esti korpe malfortaj, oni ne enkalkulu la korpedukajn horojn. Tio sekvigos, ke la gimnastika profesoro pli reale klasifikos tiun studobjekton, ĉar li ne devos timi, ke eble ia malbona atestsigno difektos la tutan ateston kaj progrespruvon de la cetere bona lernanto.

Laŭ alia patrino oni devas pli multe konsideri la biologajn kvalitojn kaj specialaĵojn de la infanoj ; tiam pli malmultaj bonaj lernantoj ricevus malbonajn signojn el la « flankobjektoj ». « En intereso de edukado al multflanka homo, al estetiko kaj lerteco oni devas havi tiujn objektojn en la lernejplano, sed iliaj instruadoj okazu ĉiam laŭ tiu ĉi celado. Dum la kantlecionoj oni devus (lau ŝi) ankaŭ prezenti — per radio au magnetofono, gramofono — kelkfoje ian facilan muzikaĵon, popularan parton de opereto kaj tiujn klarigi, pravigante, kial ili lernas ekzemple la skribadon de la muziknotoj kaj aliajn studojn. Ili lernu, kiel oni devas aŭskulti ekzemple iun operon, aŭ rigardi pentraĵon kaj ili akiru ian lertecon kaj volonte sportludu. Ili ĉiam konsciu, kial ili lernas ĉion ĉi. Ke ili entuziasme, ĝoje faru la ofte grize aspektantajn, neinteresajn taskojn. Tiam ne estos plu demando, ĉu la nomitaj objektoj estas ĉefaj aŭ flankaj. »


(Laŭ ĵurnalo **Magyar Nemzet**
P. Balkanyi, Budapest).

(Estus interese pri tiu ĉi demando ricevi opiniojn el diversaj landoj, kiel oni solvas tie la problemon ?)

LA 24-HORA AŬTOKURADO EN LE MANS

Kiel ĉiujare, en junio, okazas la 29a aŭtokurado nomita « la Mans-aj 24 horoj ». Dum tuta rondiro de horloĝa montrilo bruegas la motoroj sur la speciala aŭtokurejo.

Ofte imitita sed tute sensimila tiu okazaĵo pliriĉigas la teknikajn sciojn pri motoroj kaj kreas etoson troveblan en neniu alia loko. Ĝi estas la ellaboraĵo de la plej vivoplena franca Aŭtomobil-Asocio, la « Okcidenta Aŭtomobil-Klubo ». De longe la Sartanoj (loĝantoj de la departemento, kies ĉefurbo estas Le Mans) interesiĝis pri aŭtomobilo. Jam en 1872, Mansa industriisto, Amédée Bollée (kies filo famiĝis kiel « aŭtopioniro ») studis la problemon de mekanika veturado kaj konstruis en 1873 eksterordinaran vapor-aŭtomobilon nomitan « la Obeemulo ». Tiu aŭtomobilo ankorau funkciis en 1949 okaze de la « 24 horoj » kaj estas nun videbla en la muzeo de Artoj kaj Metioj.




De tiu tempo la junaj Sartanoj interesiĝis pri aŭtomobilo kaj aŭtomobil-kurado. Ankaŭ nuntempe la Mansanoj Jean Lucas, Tavano kaj aliaj pluportas la torĉon. En 1905 fondiĝis la Sarta Aŭtomobil-Klubo (poste Okcidenta Automobil-Klubo), kies unua celo estis organizi kuradon. Tiu unua kurado okazis en 1906, en junio, sur vojaro triangula apud Le Mans. Szisz ĝin gajnis




veturinte je pli ol 100 km. po hore. Daŭre okazis la kuradoj en Dieppe kaj Le Mans. Sed kurado nur pri rapideco ne helpas al perfektigo de la motoroj. Estis dezirinde utiligi ĝis ekstremo, en normalaj kondiĉoj, la ordinarajn, « seriajn » aŭtomobilojn. Okazis en majo 1923 la unua tiucela kurado, « Granda Premio pri Eltenemo » baldaŭ konata sub la nomo « Mansaj 24-horoj » pro tio, ke la kurantoj veturis dum 24 horoj. En la sekvaj jaroj la nombro de la alilandoj partoprenantoj kreskis. La alilandaj firmoj superis. Ekzemple la brita firmo Bentley, kiu gajnis en 1927, 28, 29 kaj 30, tiel ke la britaj sportemuloj nomis Le Mans « Bentley-sur-Sarto ».

Sed la dua mondmilito detruis la instalaĵojn de la Okcidenta Aŭtomobil-Klubo kaj nur en 1949 la kuradoj denove okazis sed kun multe pli bela kaj moderna ekipaĵo. Tuj alfluis grandnombre la interesatoj. La terura akcidento de 1955 pruvis, ke la ŝirmiloj ne plu sufiĉis, kiam la ekstrema rapideco de la aŭtomobiloj estis 280 kilometra po hore. Novaj instalaĵoj estis realigitaj kaj eĉ en 1956 la nombro de la vizitantoj estis pli granda ol antaŭe, el kiuj multe regule venas ĉiujare.

La publiko konsistas el sportamantoj kaj personoj el ĉiuj horizontoj, kiuj deziras koni aŭ retrovi la tute specialan etoson. Tiu evento estas duvizaĝa : unue la kurado mem, emociiga, plena je peripetioj kelkafoje tragediaj, kiu okazas sur vojo, kies plej granda parto estas posedaĵo de la Aŭtomobil-Klubo kaj sur kiu la Administracio de « Ŝoseoj kaj Pontoj » provos novajn materialojn kaj teknikojn ; due la svarma vivo meze de konstruaĵoj sendaŭraj, kiuj ĉiujare kreskas. Malantaŭ la « oficialaj » kaj ankau la « popolaj » sidlokoj regas granda foiro kun allogaj instalaĵoj ĉiujare pli nombraj kaj mirigaj. Malantaŭ la sidŝtuparoj ekzistas vera « Komerca Strato » kun restoracioj, kafejoj, nutraĵejoj, postoficejoj, tabak-kaj gazet-vendejoj, reklam-budoj. Ĉe la alia flanko de la vojo, de tie-ĉi atingebla per tuneloj kaj pontetoj, staras « la vilaĝo », luksa vilaĝeto kie, meze de florgajigitaj herbobedoj, ĉarmaj dometoj staras. La vizitantoj povas tie refreŝiĝi per manĝado kaj trinkado ; ili ankaŭ povas informiĝi pri turismo, pri la novaj aŭtomobiloj, viziti la Muzeon de la Aŭtomobiloj. Ankaŭ en tiu vilaĝo okazas katolikaj kaj protestantaj diservoj.



Sed la plej karakteriza spektaklo prezentiĝas en la « popola » parto. Bruo regas. Oni pi-



nikas (« kolbasas » laŭ la esprimo). Dumnokte oni dormas sur la herbo envolvita en kovriloj. Malantaŭe staras la tendoj. La aŭtomobiloj tondras, la laŭt-paroliloj krias ; el la foiraj budoj eliĝas pafbruoj kaj muzikoj. Bruas ankaŭ la radoj de la loterio, la karuseloj, la antaŭdiristinoj, la menaĝerioj kaj la « danc-dometoj ». El la pinarbareto venas odoroj de polvo, de tabako, de rezino, de motor-fumo, de « hom-amaso », de fritaĵoj. Stranga etoso. Stranga sed ankaŭ kortuŝa pro ĝia tiom homa pitoresko.

Ĉiujare vizitas la kuradon 250 aŭ 300.000 personoj. La aŭto-haltejoj akceptas 25.000 veturilojn. Malantaŭ la sidŝtuparoj etendiĝas la aerodromo, kie alteriĝas multaj privataj aŭ kompaniaj aviadiloj. Ok cent ĝendarmoj kaj policistoj kontrolas la trafikon. Diversaj kontrolistoj uzas « walkie-talkies » por certigi la kurad-direktoron pri obeo al la reguloj. Entute preskaŭ du mil personoj « laboras » ĉiutage por la bona sukceso de la « Mansaj 24 horoj ».

Ĉu tia laboro ne meritas atenton ? Ĉu tia spektaklo ne meritas viziton ?

Laŭ artikolo de Henri DELGOVE.

LA LATINA KVARTALO

Dum jarcentoj la plej elstaraj francaj kaj eĉ alilandaj verkistoj kunvenis en drinkejoj, kies nomoj restas en la historio de la literaturo : Villon ĉe « Place Maubert », Racine, Molière, Boileau ĉe « La pomme de pin » (Pinkonuso), Voltaire ĉe « Procope », Vigny, Dumas, Balzac ĉe « Café Tabourey », Mallarmé, Verlaine, Coppée, Richepin ĉe « Café Voltaire », Zola, Goncourt, Daudet ĉe « Le Coucou » (la kukolo), aliaj en « Le Vachette », « La Closerie des Lilas », ktp. Ĉiuj drinkejoj kaj tavernoj troviĝas en la sama parto de Parizo, sur la « Maldekstra Bordo » de la rivero Seine, en la tiel nomita « Latina kvartalo ».

« Latina kvartalo », magiaj vortoj, kiuj memorigas al multaj Francoj kaj alilandanoj la estintaj studentaj jaroj. « Latina kvartalo », kie naskis aŭ plifirmiĝis tiom da talentoj ; kie oni ankoraŭ tumultas sed ankaŭ multe studas ; kie oni multe pensas kaj parolas pri la estonto en la plej diversaj lingvoj ; loko kiu moderniĝis sed konservas la premsignon de la antaŭaj ok jarcentoj.

Dum la Romana epoko, Parizo estis Lutèce urbeto konsistanta el kabanoj. Sur la maldekstra flanko de la rivero etendiĝis arbo-kovrita plataĵo nomita Mons Leucotius. Tiu plataĵo fariĝis la luksa suburbo de Lutèce kaj tie staris la Arenoj kaj la Termobanejo. La Barbaroj tute detruis la konstruaĵojn sed en 507 la reĝo Clovis konstruigis tiuloke grandan preĝejon post la venko en Vouillé. La « Mons Leucotius » fariĝis « Monto Sankta Geneviève ». Sed la Normanoj detruis ĉion sur la monto. Nova preĝejo estis konstruita kaj abatejo aldonita ; ambaŭ estis protektitaj de la papoj kaj reĝoj. Pro tio en 1150, post konflikto kun la episkopo, Abelard, unu el la plej eminentaj tiamaj magistroj, translokiĝis al la « Maldekstra bordo », kun siaj studentoj kaj tiamaniere komenciĝis la historio de la Latina Kvartalo.

La alveno de la studentoj en tiun pacan kvartalon de abatejoj, preĝejoj, kampoj kaj vitejoj estis granda okazaĵo. Oni konstruigis loĝejojn. La studenta korporacio klopodis akiri privilegiojn. Ili ne estis submetitaj je impoŝtoj kaj batalservo. Ili grupiĝis laŭ siaj originoj kaj laŭ siaj studoj en « naciojn » kaj « fakultatojn ». La kunvenoj okazis en preĝejoj, la kursoj sur la stratoj. En la XIIIa kaj XIVa jarcentoj unu el la plej gravaj « studocentroj » estis la Strato de Fouarre. En la malnova franca lingvo la vorto « fouarre » signifas « pajlo ». Tiu nomo de la strato devenas de la fakto, ke la studentoj sidis sur la pajlo surstrate dum la magistro parolis de alta fenestro. La studentoj devis enkapigi ĉion ĉar ekzistis neniu krajono kaj neniu kajero.

El ĉie en la mondo venis la studentoj. Estis necese konstrui novajn loĝejojn ĉar la plej granda parto el ili dormis en keloj aŭ sub la porĉoj de la preĝejoj. Ili akiris monon almozpetante aŭ eĉ ŝtelante. Specialaj domoj estis konstruitaj ĉefe de alilandanoj por iliaj samnacianoj. Oni nomis tiujn domojn « kolegioj ».

Kapelpastro de la reĝo Ludoviko la XIIa, Robert de Sorbon (Sorbon estis verŝajne la nomo de lia naskiĝloko), opiniis, ke estus bone loĝigi en sama konstruaĵo la studentojn kaj la magistrojn. Tiamaniere naskiĝis la fama Universitato Sorbonne. Baldaŭ la kursoj okazis en la kolegioj mem. La tuta aspekto de la Latina Kvartalo ŝanĝiĝis ĉar la studentoj ne plu vagadis surstrate. Sed daure okazis la bataloj inter ili kaj la « burĝoj ». Plurfoje, kiam « burĝo » malkaresis studenton la tuta studentaro kaj la magistroj ribelis, kaj eĉ minacis foriri el Parizo.

La 13a, 14a kaj 15a jarcentoj estis la tempo de la Universitata apogeo, la tempo de Dante, Bacon, Erasme, Rabelais, Calvin. Sed en 1445 la Universitato perdis parton de siaj privilegioj kaj estis submetita je la Parlamento. En 1452 ĝi ne plu rajtis enmiksiĝi en politikaj aferoj. Francisko la unua decidis la konstruon de Reĝa Kolegio, kie oni instruis en la franca lingvo anstataŭ la latina ; la instruistoj estis ekstereklezia j kaj pagitaj de la Ŝtataj Financoj. Tie oni studis ne plu nur teologion sed ankaŭ la hebrean, la grekan, la latinan (poste la araban) lingvojn, la matematikojn, medicinon, kirurgion, anatomion, botanikon. Tiu kolegio nomiĝis Franca Kolegio kaj ankoraŭ ekzistas. Poste Richelieu rekonstruigis la Sorbonne.

De tiu tempo aldoniĝis multaj aliaj konstruaĵoj dediĉitaj al studoj. Multaj ŝanĝoj okazis. Ekzistas nun nur parto de la antaŭa strato de Fouarre. La tuta vivo de la kvartalo nun translokiĝis al Bulvardo Sankta Mihaelo. Sed ankoraŭ pli ol dum la unuaj jarcentoj venas alilandaj studentoi tien. Ĉiuj divernacianoj sekvas samajn kursojn en samaj lokoj. Ili konatiĝas, amikiĝas, ludas, laboras, diskutas kune.

Studado, amikiĝo : duobla aspekto de la Latina Kvartalo.

GEAMIKOJ !

Nombro kreas forton.

Helpu nin pliriĉigi **vian** revuon

ABONU

REABONU

ABONIGU viajn amikojn kaj korespondantojn.

(Vidu la adresojn de la perantoj sur la lasta paĝo).



KULTURAJ ARANĜOJ EN LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Okaze de la Internacia Renkontiĝo (10 an-24an de Julio 1961) prelegos S-ino E. Lapenna, S-ro Chevery, F-ino Llech Walter, D-ro Albault. Kiel prezentadon al unu el la prelegtemoj de F-ino Llech Walter ni proponas al vi la enkondukon de ŝia dulingva (franca kaj esperanta) libro titolita « Ekzistencialistaj Herooj ».

La plimulto el la personoj, kiuj uzas la vorton « Ekzistencialismo », estus certe en granda embaraso, se ili estus devigataj doni pri ĝi ekzaktan signifon. Laŭ ili, tiu termino envolvas doktrinon pli malpli skandalan, sed kiun ili tre malfacile difinus.

« Ekzistencialismo » fariĝis nun laŭmoda. Oni volonte asertas, ekzemple, ke muzikisto aŭ pentristo estas « ekzistencialisto ». Makulita, senzorge vestita, konfuze malordigita kaj malafabla, ĉiuflanken trenante sian naŭzon de kelo al kelo, kaj, malĝojera nokta kato, krurbaraktante laŭ barbaraj ritmoj, jen la stranga fenomeno, kiun ekrevas renkonti duonebriaj eksterlandanoj kaj provincanoj en Parizo.

Efektive, post la milito, senokupaj gejunuloj, afekte montrante plenan nekonformismon, almenaŭ ŝajne, invadis Saint-Germain-des-Prés. — Ĉar, de longatempe, pro siaj literaturaj kafejoj, tiu kvartalo estis ofte frekventata de Sartre, oni povis esti ema similigi tiun novan modon al la ekzistencialisma filozofio.

Fakte, oni povus apenaŭ trovi rilaton, eĉ malgrava, inter tiu fenomeno kaj la unua stadio de la sartra penso, jam transpaŝita tamen, tuj post la milito. — Sed, la neensekretigitaj personoj, opiniante ke ili vidas en la Keloj de « Saint-Germain-des-Prés », la ekzaktan rebrilon de la ekzistencialisma filozofio, konfuze kunfandis en sia spirito « ekzistencialismo » kun « malbeleco », kaj kredis ke, esti ekzistencialisto konsistis, antaŭ ĉio, el la fakto insiste intensigi la malbonan flankon de la homa vivo. Kaj la ekzistencialistaro indignigis, naŭzis, skandalis...

« Tamen, « Ekzistencialismo » estas eble la malplej skandala kaj la plej morrigora el ĉiuj filozofiaj sistemoj. Ĉiuokaze, ni elektis ĝin kiel temon de nia nuna prelego, ĉar ĝi estas la filozofia sistemo kiu povas, kiel eble plej multe, interesi la homan estaĵon.

Efektive, tiu doktrino konsentas al la homa estaĵo egan gravecon, ĉar ĝi oficiale agnoskas ke ĉiu vero, ĉiu valoro devenas de la homo kaj nur de la homo. Tial, la plej verŝajna difino de la ekzistencialismo estas la difino mem de Sartre : « Ekzistencialismo estas Humanismo » : tio estas : « Kulto al la Homaro ».

Tamen, klarigi ekzakte « kio estas ekzistencialismo » ŝajnas al ni malfacile, ĉar ni havas antaŭ ni du dis-irantajn tendencojn : unuparte, la kristanaj ekzistencialistoj, inter kiuj decas envicigi :

— La danon Kierkegaard (de la jaro mil okcent dektria, ĝis la jaro mil okcent kvindek kvina), uzis la terminon « Ekzistencialismo » ;

— La francon Gabriel Marcel, katolika, kiu naskiĝis en la jaro mil okcent okdek naŭa ;

— La germanon Karl Jaspers, kiu naskiĝis en la jaro mil okcent okdek tria, kiu, kvankam edukita en Protestantismo, konfesas, ke li multan spiritan profiton ricevis el la katolikaro.

Aliparte, la ateistaj ekzistencialistoj, kies ĉefaj pioniroj estas :

— La germano Heidegger, kiu naskiĝis en la jaro mil okcent okdek naŭa,

— kaj la francaj ekzistencialistoj nuntempaj, Sartre, Simone de Beauvoir, Merleau-Ponty.

Kompreneble, ni povas nek ellerni plendetale tiujn diversajn doktrinojn kun iliaj propraj karakterizaĵoj, nek doni, tiamaniere, kompletan panoramon de la « ekzistencialismo ».

Ŝajnis al ni interese limigi nin, inter la filozofoj, al tiu kiun oni konsideras en Francujo kiel la vera pioniro de la ekzistencialismo, al tiu ankaŭ, kies verkaro okazigis la plej grandan indignon, Jean-Paul Sartre. — Aliparte, oni povas konsideri tute prave Sartre kiel la teoriiston de la ateistaj ekzistencialistoj.

Plie, alia kialo gvidis nin en la elekto de tiu filozofo. De longatempe, la celo de la filozofio ŝajnis malproksimiĝi kiel eble plej multe de la vivo kaj fariĝis, tiamaniere paradoksa kaj neutila. Oni opiniis ĝenerale, ke estas eble trovi veran filozofion, nur en pezaj traktaĵoj plenaj de subtila dialektiko.

Jen, de kelkaj jaroj, la filozofo fariĝis homo ; li fariĝis estaĵo en la mondo ; la filozofio estas ne plu rezervita al eta nombro de ensekretigitaj personoj.

